

---

# ĜENERALA ASEMBLEO

## Kunsido de la 31a de majo 2014

---

Sabaton la 31an de majo 2014, de la 9a00 ĝis la 11a30, kunsidas en Chambéry la Ĝenerala Asembleo de Esperanto-France. Ĉeestas 56 homoj.  
Prezidas: Axel Rousseau (AR). Protokolas: Aleks Kadar (AK), kun helpo de Xavier Dewidehem (XD).

### 1. REZULTO DE LA VOĈDONOJ

#### Agada raporto 2012-2013

Voĉdonis :	202
Nevalide voĉdonis :	10
Valide voĉdonis :	192
Sindetenis :	0
JES :	192
NE :	0

⇒ **Agada raporto aprobita**

RT atentigas pri gramatikaj eraroj en la parto pri KER, kaj pri manko de la Provenca raporto, kvankam ĝi estis sendita frue. Manko agnoskita de la estraro, kiu re-aldonos ĝin en la reta versio de la Jara raporto.

#### Financa raporto 2012-2013

Voĉdonis :	202
Nevalide voĉdonis :	10
Valide voĉdonis :	192
Sindetenis :	6
JES :	186
NE :	0

⇒ **Financa raporto aprobita**

RT demandas pri donacoj. 2200 EUR malpli, kiel oni kompensas ? Temas pri la KER-ekzamenoj, kiujn ni apartigis pasintjare. Veturkosto-repagoj por Susanna ne aperas, ĉar estis pagitaj post 1a oktobro. Frais de relance : ne aperas, ĉar ni relanĉis per telefono, ne per leteroj.

#### Parta renovigo de la Komitato

Voĉdonis :	202
Nevalide voĉdonis :	10
Valide voĉdonis :	192
Postulita minimumo :	96

Pierre BOUVIER : 176  
Xavier DEWIDHEM : 189  
Julia HEDOUX : 188  
Didier LOISON : 191  
Claude NOURMONT : 182  
Anne-Émilie RAVACHE : 181

⇒ **Ĉiuj 6 kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al ili kaj bonvenon en la Komitato!**



## 2. FINANCO

Kontoj 2012-2013 : Prezento de la bilanco kaj spezkonto

AER listigas la klubojn kiu aliĝis per la Franca Interasocia Kotizo : 8

Tio estas: Albertville, Béziers, Bourg-en-Bresse, Gap, Moûtiers, Nîmes, Périgueux, Strasbourg.  
AER ekpreparis dokumenton klarigantan la novan kotiz-sistemon.  
Pierre Grollemund, Claude Gerlat : nun ni atendas la klaran, detalan teksteton.

### Membraraj statistikoj

je 30a septembro 2013:                    **544** membroj                    295 abonantoj al LME

### Membroj laŭ federacio

**Vidu la tabelojn laŭ la ligilo:** (paĝojn 21-22)

[https://docs.google.com/presentation/d/14Cn9qhrua1pz\\_t\\_epZoNynAiCOgIqVon\\_8d4q7Z3odc/edit#slide=id.g345aab60a\\_41](https://docs.google.com/presentation/d/14Cn9qhrua1pz_t_epZoNynAiCOgIqVon_8d4q7Z3odc/edit#slide=id.g345aab60a_41)

Novaj abonantoj al LME laŭ unua-jara prezo: **93**

JPB timas ke la kluba kotizo estu danĝera pro tio, ke iuj kluboj kolektive aliĝu al SAT-Amikaro anstataŭ EF. La klubo de Clermont-Ferrand jam estas ekzemplo de tio.

AR proponas ke ni trovu aliajn solvojn kiam la nombro de kluboj aligxantaj al la sistemo ne plu kreskos. Sed antaŭ tiu tempo, ne indas ŝanĝi bonan sistemon. SM memorigas ke oni rajtas esti membro de ambaŭ asocioj. Eblas aliĝi al ambaŭ samtempe. BF ne komprenas, kial ni komparas SAT-Am, tema asocio kaj EF, federacio de kluboj.

SM : por tiuj kluboj, eblas aboni al LME je 8 EUR.

DJ petas statistikon laŭ aĝo kaj SM respondas ke eblas kalkuli tian statistikon.

### Proposition de dons réguliers : 2 € par mois

Pro enkonduko de SEPA, ni batalas kontraŭ la banko por ebligi la ĝiron. Eble ni esploros novan eblecon: ŝanĝi la bankon, enkonduko de nova sistemo kiel HelloAsso.com.

## 3. AGADOJ

### 3.1. Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado

#### Expolanguages

Komence de februaro, dum 4 tagoj estis tuta skipo de ne nur parizaj volontuloj. Ni disdonis milojn da kalendaroj kaj kolektis kontaktojn. Ni poste organizis prelegon kaj kurson. Eĉ se la rezulto ne videblas tuj, indas daŭrigi nian ĉeeston al Expolanguages. Usona ĵurnalisto intervjuis nin kaj aperigis artikolon pri Expolanguages en usona ĵurnalo pri lingvoj. ([http://languagemagazine.com/?page\\_id=32208](http://languagemagazine.com/?page_id=32208)).

Adresoj estis kolektitaj por inviti la homojn al kursoj. Federacioj ricevis slipon el tiuj adresoj.

MD deĵoris en Expolanguages, havis kontakton kun instruisto en Lille 3, kaj tial li povis prezenti esperanton en la Lillan universitaton.

#### Retejo

Pro la balotkampanjo de EDE tre plimultiĝis la vizitoj al la retejo de UFE.

DL peris kontaktojn de ĵurnalistoj al EDE.

DL arigis diversajn informojn celantajn la ĵurnalistojn en aparta rubriko de la menuo, atingebla per la maldekstra menuo kaj la supra banderolo.

Krome, li kreis rubrikon pri instruado, kie li enretigis artikolojn pri tiu temo. Li aldonis en la rubriko Eventoj la ligan al la lasta kalendaro de Esperanto-Aktiv. Informojn pri ontaj eventoj sendu al François Bartsch.

La kadukaj informoj en la kontaktaro de nia retejo (rubriko "L'espéranto près de chez vous") povas esti ĝisdatigitaj sendante freŝajn informojn al Susanna.



La retejon "Esperanto-Panoramo" kreis Xavier Godivier, al kiu nun mankas tempo por prizorgi ĝin. Multaj informoj estas kadukaj. Ĝisdatigu UFE kaj indas fermi la parton pri kluboj en tiu retejo.

### **Gazetaraj artikoloj**

AK kaj DL kolektis gazetarajn artikolojn kaj enretigis ilin. "Articles parus dans la presse" en la rubriko "Revue de presse". Dank'al tiu arigo, DL faris statistikojn. Vd. tabelon. 2 aferoj rimarkeblas : en majo 2014 multaj artikoloj, pro la eŭropaj balotoj. Steleto kiam estis Gazetara Komuniko de EF. Multaj artikoloj pro agado de lokaj kluboj.

Pierre Grollemund: komento pri ĵurnalo Le Monde. " En unu frazo, 2 eraroj !! Tamen ili enpoŝigis la monon de Mijoshi antaŭ kelkaj jaroj. Ili estas parizaj sencerbuloj. "

AR informas ke ekzistas listo Reago-fr, kiu kolektas reagindajn artikolojn kaj preparas reagojn.

AER raportas, ke samaj problemoj okazas kun politikaj partioj. "Plendu en tiuj kazoj" diris ĵurnalisto. Se nur unu homo reagas, malpli videblas la plendo. Ligilo al Reago-fr: <http://groups.google.com/group/reago-fr?hl=eo>

### **Gazetaraj komunikoj**

Listo de la GazKom-oj ekde la kongreso 2013 en Artigues. (paĝon 38). Pluraj (la verdaj) okazigis artikolojn. La tuta listo disponeblas sur <http://esperanto-france.org/communiqués-de-presse>

Se okazas eventoj, indas sendi informon al François Bartsch por la kalendaro kaj al Didier Loison por GazKom.

### **Sociaj retoj**

Unu mesaĝon en la franca lingvo ĉiujn 2 tagojn en FB (750 legantoj) kaj Twitter (220). Via helpo bonvenas!

### **Esperanto-Aktiv'**

Ĉiumonata letero en la franca lingvo estas sendita al 4030 abonantoj. Temas pri eksaj lernantoj, vizitantoj en Expolangues kaj ĉiuj niaj membroj. Esperanto-Aktiv' konsistas el 4 partoj : Kulturo aŭ intervjuo, Ils l'ont fait...dans leur région, Kalendaro, Lu, vu, entendu ce mois-ci (recenzo de kulturaĵo). Ni bezonas vian helpon. Dankon al Anne Jausions, Sylvain Barrier, kiuj verkis por Le livre du mois.

Informojn vi sendu al [axel.rousseau@esperanto-france.org](mailto:axel.rousseau@esperanto-france.org) aŭ [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

Monique Arnaud plusendas ĝin al siaj Federacianoj. Ŝi povas proponi al ili aboni la retleteron.

Por aperigi informojn en la rubriko "Ils l'ont fait", bv sendi raporton kun fotoj al Jeanne-Marie Cash : [rcash@free.fr](mailto:rcash@free.fr)

Jeanne-Marie enpaĝigas, Susanna eldonas la etikedojn kaj Raymonde fotokopias kaj sendas al membroj kiuj ne havas interretan adreson (aŭ ne donis ĝin al la asocio). La nombro da ricevantoj varias, 144 por la monato majo 2014. Kosto : pli ol 1100 EUR por la tuta jaro.

## **3.2. Interasocia kunlaboro**

La ĉefa interasocia agado (inter Espéranto-France kaj SAT-Amikaro) dum la periodo estis la petskribo "espéranto au bac" Vidu la foton de AR kun ED, Guy Cavalier, FLJ ĉe la Ministrejo. <http://esperanto-france.org/l-esperanto-au-bac>

La junulo mem lernis per la reto, esperas trapasi E-on au bac post 2 jaroj, ekzameniĝis je C1 en majo 2014. Pli ol 33 000 subskriboj.

## **3.4. Kulturo, eldono kaj kongresoj**

### **100a Universala Kongreso de Esperanto: Lille2015**

La venonta ĉefa Esperanto-evento en Francio estos la UK 2015 en Lillo, de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto en kongresejo Lille Grand Palais apud la urbocentro. Konsistiĝis LKK kun temaj skipoj: ĝi kunsidis decembron 2013 en Parizo kaj aprilon 2014 en Lillo. Espéranto-France kunlaboras kun UEA.

La LKK serĉas volontulojn : minimume 60 homoj estas bezonataj por akceptado de kongresanoj. Por



ekskursoj, buŝtradukantoj, ĉiĉeronoj kaj akompanantoj estas serĉataj. Komencantoj ankaŭ povas helpi al la organizado de Lille2015. Bonvolu helpi nin, starigante tiun afiŝon en viaj klubejoj :

[https://docs.google.com/file/d/0Bwr\\_axGW\\_3oCQi1fSkpwNVI2Z1U/edit](https://docs.google.com/file/d/0Bwr_axGW_3oCQi1fSkpwNVI2Z1U/edit)

Kontakto : [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr) Informoj: [www.lille2015.fr](http://www.lille2015.fr)

#### Diversaj demandoj :

##### *Akceptado :*

Emmanuelle Paris : pri la helpantoj, kiom da tagoj antaŭe ili alvenu en Lillo ?

Julia Hédoux : Pri akceptantoj, 1 aŭ 2 tagojn antaŭe, sufiĉos. Ne la 60 homoj devas esti surloke antaŭe.

##### *Ekskursoj :*

Ekskursoj al Parizo, Lillo, Amieno, Bulonjo, Reims, Asterix-parko...

Claude Nourmont : pri la ekskursoj, la ĉefa bezono estas ĉiĉeronoj. La ekskursoj (dum-, antaŭ- kaj postkongresaj) okazu en Eo. Tiucele okazos staĝoj, gvidotaj de profesiaj ĉiĉeronoj. Okazos staĝo de 10a ĝis 15a junio en Kvinpetalo, Bouresse. Ne hezitu demandi al mi ! Ne nepras veni la 5 tagojn. Jam nun sekvu staĝon, eĉ se vi ne havas nun altan nivelon. Vi progresos ĝis venonta jaro.

André Grossmann : ĉu la ĉiĉeronoj ricevos klarigojn pri la vizitotaj lokoj ?

Julia Hédoux : jes kompreneble. La ekskurs-helpantoj povos esti gastigitaj en Lille antaŭe.

Katja Boen : klarigas pri la ekskursoj.

Claude Jausions : ĉu al Le Louvre-Lens ? Jes.

Katja Boen : Ni studas la eblecon ke la Muzeo enmetu Esperanton en sian aŭdilon.

Amieno estu duontaga ĝis la vespero, ĉar vespere la katedralo estas lumigata.

##### *Kultura programo :*

RT : demando pri la Kultura programo. Ĉu oni planas havi simplajn prelegojn, inter alie por komencantoj, pri Francio, "Pecha-Kucha"-jn ... ? [Noto: [Pecha-Kucha](#) estas [evento](#) kun [prelegoj](#) rapidaj, [bildaj](#)]

JH : ankoraŭ ne klaras, zorgas pri tio Céline B. kaj Raymonde C.

CN : Simplaj prelegoj k.s. dependas de decido de UEA, kiom da salonoj ni havos je dispono. Estos Kleriga Lundo, faciligaj programeroj.

En la UK 2013 (Rejkjaviko) estis pluraj prelegoj pri Islando, same en Lillo estos serio da prelegoj pri Francio.

##### *Spektakloj :*

Publikaj spektakloj okazos en Lille-Plage.

##### *Komunikado:*

Respondecas Xavier Dewidehem, Bruno Flochon, Cyrille Hurstel, Didier Loison

Honora Komitato: la unua celo estis trovi 100 patronojn (propono de Edmond Plutniak).

Ni serĉas varbantojn en la urbo. Serĉo de mecenatoj : "La mono estas la nervo de la milito".

##### *Infana Kongreseto :*

Michel Dechy : okazos samtempe Infana Kongreso. Helpantoj bonvenas.

##### *Loĝado :*

SM : ĉu estos amasloĝejo ?

JH : devus esti sed ni ne ankoraŭ serĉis

Michel Dechy : estas nova junurlargastejo.

Por pliajn demandojn, skribu al [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr)

### **Venontaj landaj kongresoj**

2015 : Ĉu dum Lille2015 ? Ĉu nur membrokunveno ? En Parizo ? maje, junio ? en la Domo de la asocioj sabate ? Aŭ post la UK ? ĜA en majo en aŭ apud Lille, okaze de preparakunsido al Lille2015 ?

2016. CN : kio pri Normandio ?



#### **4. DIVERSAĴOJ KAJ DEMANDOJ DE LA MEMBRARO**

RT :

Kio pri eldonado ? En la kontoj 2348 EUR ricevitaj por la projekto Nova lernolibro.

Asteriks : la eldonisto ne deziras transdoni traduk-raĵojn al eldonejo kiu deziras traduki nur unu albumon.

Ideo de libro en Eo por lerni la francan. Povus esti interesa por nefranccparolantoj kiuj partoprenos UK en Lille.

Pri la nova lernolibro: la afero ne multe antaŭeniras. Christophe Chazarein iomete laboris pri tio.

Pri Kumeŭaŭa, AR kontaktis dekon da eldonistoj, kiuj rifuzis. Eblus mem eldoni ĝin sed estos poste malfacile por disvendi ĝin.